


Bulgara **ESPERANTISTO**





Reprezentantoj de du malproksimaj generacioj, sed kun forte reciproka amo: nia E-veterano Boris Kavalgiev el u. Ruse kaj lia nepo, kiu nun komencas balbuti en Esperanto.



En Velingrad septembre okazis internacia feriado kaj E-kurso. Partoprenis 29 gegrekoj, 4 polinoj, 2 italinoj, 1 francino, bulgaroj. Kursgvidantoj: Kunčo Vălev kaj Ŝterju Kukuŝev.

Redakta Komitato:

Kunčo VĂLEV (ĉefredaktoro), Vasil BORO-VANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria IANKOVA, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Flori NIKOLOV.

Sekretario-administranto: **Metodi Garev**

Korektis: **M. Elenova**

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

ENHAVO

* * *	Alvoko al la prudento kaj la kon-	1
D-ro Nikolaj Tanev.	Pri kelkaj kvalitoj de la esperantisto	2
Kunčo Vălev.	La ŝtala bulgara poeto Nikola Vapcarov	3
Nikola Vapcarov.	Kredo. Traduko de Asen Grigorov.	5
Dimitro Denĉev.	Standardo	5
„ * *	Eksterlandanoj pri Nikola Vapcarov	6
* * *	Literatura konkurso	7
* * *	Договор между читалище „Иван Владков“ и есперантско д-во „Иван Владков“ в Дряново	7
„BE“, N. Nejkov, St. Pavlova ka.	Ondo de E-kursoj tra la lando	8
Anton Antonov.	Tria kooperativa konsultiĝo en Kubrat	9
V. Anastasov.	Vegetarana E-societo en Bulgario	9
Katja Marinova.	Kara gasto el GDR	9
E. G.	La 35a Internacia Junulara Kongreso	10
T. B.	I Centra Internacia E-Laborbrigado en Hungario	10
S. K.	Landa E-konferenco en Rumanio	11
* *	Letero de amikeco de T. Maeda	11
K. Vălev.	Rajna Konstantinova jubileas.	12
Adolf Holzhaus.	Aleksandro Zilbernik — la bopatro	15
E. Dragolova, T. Zagorska.	Rememoroj pri la E-vivo en la pedagogia lernejo de Loveĉ	15
V. Boz.	Aktiva batalinto	15
Rajna Konstantinova.	Facetoj de la Internacia Infanasembleo „Standardo de la paco“	15
Cv. T.	La infanoj de Ŝumen pentras	IV
St. Pochanka.	Renkontiĝo de E-familioj	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Foto de la bulgara poeto-revoluciulo Nikola Vapcarov

KOREKTO. En la kanto „Aŭtuno“, aperinta en n-ro 10, en la fino de takto kvina (la mezo de la dua liniaro) la teksto ekde „amare promenar . . .“ ĝis la fino de la oka takto devas iri per unu noto maldekstren, do la unua „a“ de la vorto „amare“ devas veni sub la noton „do“ (deksesono). Tiukaze sub la lasta noto de takto oka devas esti la vorto „sur“ por ripeto.



ALVOKO AL LA PRUDENTO KAJ LA KONSCIENCO

Nur tiel oni povas difini la plej novan paŝon de la Soveta Registaro por profundigo de la proceso de internacia serenigo ankaŭ en la militsfero kaj por firmigo de la tutmonda paco. Paŝo klara kaj reala: reduktado de la soveta armeo en Centra Eŭropo per 20 000 homoj kaj 1000 tankoj!

Tiun deklaron faris la gvidanto de la soveta ŝtato kamarado Leonid Iliĉ Breĵnev — ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio kaj Prezidanto de la Supera Soveto de Sovetunio — en sia parolado en Berlino lige kun la solena celebrazo de la 30a datreveno de la fondiĝo de Germana Demokratia Respubliko. Nature, tio samtempe estas arda alvoko al la kapitalismaj landoj fari la samon.

Kun ĝojo renkontis tiujn proponojn la ordinaraj homoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj kontinentoj. Ilia fido al la politiko de Sovetunio kreskas pli kaj pli. La milionoj da homoj el la tuta mondo vidas ke la ekstera politiko de Sovetunio fidele kaj konsekvence sekvas la testamenton de la granda Lenin — la unua ŝtatestro, kiu laŭte kaj sincere proklamis la politikon de paco kaj internacia amikeco kiel oficialan politikon de la unua en la mondo ŝtato de liberaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj. Nome Lenin propramane skribis la unuan dekretan de la Soveta Registaro jam la unuan tagon post la Oktobra Revolucio — la Dekretan de la Paco. Ĝuste tiun vojon sekvas la soveta ŝtato, ĝin sekvas neflankigante ĝia unua gvidanto k-do Leonid Breĵnev.

Nefoje li estis nomita arkitekto de la paco. En tiu difino entenigas la krea spirito de la soveta ekstera politiko, ĝiaj konstantaj kaj realismaj iniciatoj serve al paco kaj interpopola komprenigo, ĝiaj konstruaj principoj, por ke estu lumo kaj ĝojo en ĉiu lando, sur la tuta planedo . . . Kun la aŭtoritato de plej supera gvidanto de la soveta ŝtato, kun la aŭtoritato de prezidanto de la Konsilio de Defendo de Sovetunio k-do Breĵnev nedusence deklaris: „En Eŭropo, samkiel en ĉiuj aliaj regionoj de nia planedo, ni volas pacon, daŭran pacon. Tio estas la bazo de nia ekstera politiko, ĝia vertebraro. Tiun politikon ni sekvas konsekvence kaj firme.“

La disvolviĝo de Eŭropo kaj de la mondo post la Dua Mondmilito montras kreskantan potencon kaj vastan influon de la reala socialismo — la ĉefa gvida forto de nia epoko, la ĉefa garantianto de la paco. Substrekte tiun fakton k-do Breĵnev diris ankaŭ: „La socialisma internaciismo estas la politika kaj morala forto, kiu donis al ni eblecon elmiliti multajn venkojn en la batalo por paco kaj socia progreso.“ Frukto de la socialisma internaciismo estas ankaŭ la plej nova paca iniciativo de Sovetunio kaj de la tuta socialisma komunaro.

Kun aparte profundaj ĝojo, fido kaj espero renkontis la parolojn de k-do Breĵnev nia popolo, nature ankaŭ la bulgaraj e-istoj. La problemoj de malarmado, de internacia amikeco kaj paco estas niaj esencaj problemoj. La bulgara popolo sincere deziras pacon, laboras por paco, batalas por paco.

D-ro Nikolaj Tanev

PRI KELKAJ KVALITOJ DE LA ESPERANTISTO

Interkompreniĝo, amikeco kaj paco inter ĉiuj popoloj estas unuj el la plej grandaj celoj de la E-movado.

Kiajn kvalitojn devas posedi la e-isto, por atingi kaj efektivigi tiujn celojn?

Pri la interkompreniĝo. La e-isto devas forte ami la internacian lingvon E-o. Li devas ĉiam perfektigi sin, ĉiam plivastigi kaj profundigi siajn konojn. Tio signifas, ke li devas esti sciama kaj laborema homo. Sed siajn konojn li devas utiligi ne nur por si mem, sed ankaŭ por komuna kaj internacia bono. Tio signifas, ke li devas esti sociaganto, bona propagandanto kaj internaciisto.

Pri la amikeco. La e-isto devas esti bonanima homo. En lia koro ne devas ekzisti malamo kaj malico al homoj kaj popoloj. Li devas havi kontaktojn kun multe da samideanoj el diversaj landoj kaj kontinentoj. E-o estas bonega ilo por tiu ĉi celo. Per nia lingvo la e-isto devas multe korespondi, interŝanĝi presaĵojn, pupojn en naciaj kostumoj, artaĵojn, diversajn memoraĵojn. Se eksterlanda e-isto aŭ amiko de e-isto petas lian helpon pri io, li volonte devas helpi laŭ siaj ebloj. La reciproka helpemo estas karakteriza trajto de la veraj e-istoj. Volonte la e-isto devas helpi eksterlandan samideanon, se li bezonas tranokti, rigardi la vidindaĵojn de la urbo ktp. Per sia helpemo kaj gastamo la bulgara e-isto ne nur plenumas sian moralan homan devon, sed li ankaŭ firmigas la inter-

nacian solidarecon kaj altiras novajn amikojn de nia popolo kaj lando. Tiamaniere li agas kiel vera patrioto kaj internaciisto.

La e-isto, kompreneble, devas ne nur korespondi, sed ankaŭ multe vojaĝi al eksterlando, partopreni E-kongresojn, konferencojn, renkontiĝojn, tendarojn, kursojn ktp. aŭ simple por gasti al sia korespondamiko kaj konatiĝi kun lia lando kaj popolo. La rektaj kontaktoj pleje favoras la amikecon inter homoj kaj popoloj.

Pri la paco. La e-isto devas ne nur paroli, sed ĉiam ankaŭ labori praktike kaj batali por la paco. Li devas senmaskigi tiujn reakciajn fortojn en sia propra lando kaj en la tuta mondo, kiuj deziras militon, propagandas militon, preparas militon per konstanta plialtigo de la militbuĝetoj, eltrovas kaj fabrikas ĉiam pli kaj pli terurajn armilojn por amasmortigado kaj provokas malgrandajn militojn en diversaj teranguloj. Tiaj reakciaj registaroj kaj la subtenantaj ilin ekonomie fortaj klasoj pensas nur pri siaj propraj interesoj kaj neniel pri bona vivo kaj feliĉo de la popolamasoj en siaj landoj. La ordinaraj homoj, la popoloj nek ŝatas, nek volas militon. Por ili la milito portas nur suferojn, detruojn kaj morton.

Kiel humanistoj kaj internaciistoj la e-istoj devas esti ĉiam fidelaj pacamantoj kaj aktivaj pacbatalantoj.

Noto de la Redakcio. Ni petas ankaŭ aliajn legantojn sendi al ni materialojn pri la neordinare grava kaj aktuala demando rilate al la morala aspekto de la e-isto — kia ĝi estis, kia estas kaj — la plej grava — kia ĝi devas esti. Konvenajn materialojn ni aperigos.



LA ŜTALA BULGARA POETO NIKOLA VAPCAROV

Ĉiu poeto — samkiel ĉiu homo — havas sian neripeteblan sorton. Al Nikola Vapcarov la sorto estis tre kruela dum lia vivo kaj tre malavara post la morto. Li vivis pezan vivon kaj pereis en la disfloro de sia juneco kaj kreaĵ fortoj. Sed neniuj bulgara poeto antaŭ kaj post li ĝuis tian internacian popularecon kiel Nikola Vapcarov. La potenca tutmonda movado por paco kaj amikeco inter la popoloj post la venko super la bruna pesto de la faŝismo danke ekportis sur siaj ondoj liajn kantojn tra la tuta mondo. En 1952 la bulgara poeto kaj nacia heroo Nikola Vapcarov postmorte estis distingita per la Honora Premio de la Paco.

Vapcarov naskiĝis en 1909 en urbo Bansko, situanta en la piedoj de Pirin-monto. Post kelkaj klasoj de la gimnazio li, laŭ la volo de sia severa patro, ekstudis en la Marista Maŝinlernejo en u. Varno, kiun li finis en 1932 j. Lia revo estis studi literaturon en la Universitato, sed tio ne eblis pro manko de monrimedoj. Kaj li eklaboris kiel laboristo-hejtisto, poste kiel teknikisto kaj denove laboristo en diversaj privataj kaj ŝtataj entreprenoj. Do li persone sufiĉe akre spertis la amaron de la vivo en la burĝa socio, konstruita sur la principo de ekspluatado de homo fare de homo.

En 1940 la soveta registaro pere de la diplomato Sobolev faris proponon al la bulgara cara registaro subskribi pakton pri neagreso inter ambaŭ landoj. La Bulgara Komunista Partio organizis tra la tuta lando kolektadon de subskriboj subtene al tiu propono. Ankaŭ Vapcarov iris el Sofio al sia naskiĝregiono por agiti kaj kolekti subskribojn por la pakto. Pro tio li estis arestita kaj juĝita. Fine oni devige loĝigis lin en la izolita urbeto Godeĉ.

Reveninte Sofion, Vapcarov dediĉis ĉiujn siajn fortojn al konspira batalo en la vicoj de la rezista movado kontraŭ la bulgara kaj germana faŝismo. Malfeliĉe en marto 1942, vivante jam duonleĝe, li estis arestita. Kvar monatojn oni torturis lin plej kruele en la direkcio de la polico: batado ĝis perdo de la konscio, pendigo kun la kapo malsupren, bruligo per kurento. . . Sed la ŝtala komunisto ekflustris eĉ ne vorton. Kaj kiam la 23-an de julio oni starigis lin antaŭ la faŝista tribunalo kaj kondamnis lin al morto kune kun aliaj kvin elstaraj funkciuloj de la Bulgara Komunista Partio, li trankvile renkontis la verdikton, dirante al la juĝistoj: «Indulgon mi volas de neniuj!» La saman vesperon li kaj liaj kamaradoj estis pafmortigitaj. La sesopo renkontis la kuglojn per la amata Botev*-kanto: «Ja kiu falas por la libero, mortas neniam. . .»

Tio estas eta skizo pri lia mallonga vivo, plena de suferoj, de batalo por la ĉiutaga pano, de streĉiteco. Sed tiu ĉi vivo de Vapcarov — kiel oni vidas tion el lia poezio — estis vaste ga, riĉa kaj skuata de plej dramaj eventoj kaj nepacigeblaj konfliktoj.

Krom la socia realaĵo en kapitalisma Bulgario ankoraŭ du aliaj faktoroj havis unuarangan signifon por la formiĝo de Vapcarov kiel civitano, komunisto-revoluciulo kaj poeto: unue, la laborista medio, en kiu li ekvivis kaj laboris tuj post la fino de la studado en la Marista Lernejo, kaj, due, la ek-

* Ĥristo Botev (1848—1876) — unu el la plej grandaj kaj amataj bulgaraj poetoj kaj revoluciuloj, pereinta kiel vojevodo de ribelula taĉmento en batalo kontraŭ la otomana jugo.

zisto de la granda Sovetunio — la unua lando de liberigitaj laboristoj kaj kamparanoj. Vapcarov soife akceptis ĉiun informon pri la konstruado de nova vivo sur unu sesono de la tero, avide legis sovetaĵajn librojn, spektis senescepte ĉiujn sovetaĵajn filmojn. Per la ekzemplo de la sovetaĵaj homoj la batalantoj por socialismo el la tuta mondo jam vidis pli konkrete la estontecon, por kiu ili mem batalas.

En sia kvante malgranda, sed enhave kaj probleme riĉega verkaro Vapcarov faris imponan prezenton de sia epoko kaj de nia bulgara socio. En tiu epoko li kuraĝe elektis la vojon de batalanto kontraŭ la malnova mondo de socia maljusto, senrajteco kaj manko de libero. Kontraŭ la malnova vivo li batalis senĉese per ĉiuj fortoj:

Jen
brulas mi,
vi ankaŭ brulas,
en ŝvito
ambaŭ ni baniĝas.

Vapcarov firme kredis, ke en tiu batalo venkos liaj ideoj de komunista humanisto. Kaj por li ne gravis, ĉu li persone restos viva, malgraŭ lia forta amo al la vivo. Eĉ male — li estis preta morti en la batalo, ĉar tiu morto estas senmorto:

Sed morti, kiam liberiĝas
la ter'
el sia ŝlim' venena,
kiam la milionoj reviviĝas, —
ĝi estas ja poemo,
jes, poemo!

En la poezio de Vapcarov sonas la tuta natura vero de la vivo, ĉar tiu ĉi poezio estas kreita de persono, kiu nefaras diferencon inter paroloj kaj agoj. Vapcarov tre alte taksis la arton kaj la postulojn de la vivo. La grandan signifon de la arto li vidis ĝuste en ĝia servado al la vivo. Tial en liaj verkoj la vivo tute nature transformiĝas en poezion, kaj la poezio — en vivon.

Iuj poetoj serĉas grandiozajn temojn, por kaŝi per la grandiozeco de la temo

sian kreon senpovecon. Vapcarov iris tute alian, inversan vojon. En la plej ordinaraĵoj, en la ĉiutagaĵoj ekzistado kaj vivolukto li scipovis vidi la grandon kaj bonege elmontris ĝin kiel grandon en siaj verkoj mem.

Kiel internaciisto Vapcarov kun profunda amo prikantis la batalon de la hispana popolo kontraŭ la faŝismo de Franko kaj ĝiaj italaj kaj germanaj helpantoj. Al la hispanaj demokratoj li dediĉis apartan ciklon en sia kolekto «Motoraj kantoj», eble unu el la plej bonaj en la monda poezio, dediĉita al tiu batalo.

Per sia tuta poezio la granda bulgara poeto Nikola Vapcarov arde alvokas al solidareco de ĉiuj progresemaj fortoj de la popoloj kontraŭ la nigraj fortoj de socia sklaveco kaj senrajteco, de nacia malamo kaj militarismo — por nova mondo de libero kaj justeco, de paco kaj internacia amikeco.

Delonge la verkaro de Vapcarov estas tradukita en pluraj lingvoj en la mondo. En 1960 j. aperis libroforme ankaŭ en Esperanto «Elektitaj versaĵoj» de li. Kiel oni jam scias, la juna Vapcarov lernis Esperanton, dum sia vivo estis en kontaktoj kun e-istoj kaj havis ĉiam pozitivan rilaton al E-o. Certe jam estas tempo, ke oni pli plene prezentu en E-o lian alt-nivelan verkaron. Tio estos valora kontribuado de nia popolo al la trezorejo de la tutmonda literaturo.

Kunĉo Vălev

... Legante Vapcarov, dum la tuta tempo mi aŭdas la konvinkitan kaj pro tio konvinkan voĉon de la bulgara proleto, de la batalanto-kontraŭfaŝisto. La linioj antaŭ mi ne estas elpensitaj, sed trasuferitaj. Ni kredas al Vapcarov. Ne hazarde la unua versaĵo de liaj „Motoraj kantoj“ estas titolita „Kredo“.

Neniam mi vidis Nikola Vapcarov, sed ŝajnas al mi, ke mi konas lin delonge. Tiujn ĉi proksimecon kaj certecon li sugestis al mi per siaj versaĵoj.

Lev Ozerov, USSR

*El la antaŭparolo al la libro
«N. Vapcarov. Versaĵoj», Moskvo, 1964*



K R E D O

Jen do — mi spiras,
laboras,
mi vivas
kaj verkas poemojn
(laŭ mia kompreno),
la vivon severe
rigardas subbrove
kaj luktas surtere
kun ĝi mi laŭpove.

La vivon mi spitas.
kun ĝi mi militas,
sed vi ne komprenu,
ke mi ĝin malamas.
Ho male, ho, male!
Se morto eĉ venus, —
la vivon kun ŝtale
krudfortaj manegoj
ja tamen mi amus!
Ja tamen mi amus!

Imagu: min oni pendigas
kaj oni demandas:
„Ĉu horon deziras
vi resti vivanta?“
Mi tuj ekindignos:
Demetu!
Demetu!
Demetu! rapide
la maŝon banditoj!“

Por ĝi — por la vivo —
mi farus ja ĉion.
Mi flugus
ĉielen per prova maŝino,
mi sola enirus
eksplozan raketon;
mi serĉi dezirus
tra l' kosmo
plej foran planedon.
Kaj tamen mi sentos
la tiklon agrablan
rigardi
la foran
lazuron ĉielan.

Kaj tamen mi sentos
la tiklon agrablan:
mi vivas ankoraŭ,
mi estas ankoraŭ.

Sed jen, ni supozu,
ke rabas vi — kiom? —
grajneton tritikan
de kred' mia nure,
mi tiam ekkrius,
ekhurlus terure
pro granda doloro,
samkiel pantero
vundita en koro.

Ja kio do restus
de mi post la rabo?
Rabita, mi estus
ja nur mizerulo.
Kaj eĉ pli klare,
kaj eĉ pli vere —
tuj post la rabo
fariĝos mi nulo.

Eble vi volas
ĝin neniigi,
ĝin — mian kredon
pri tagoj feliĉaj,
ĝin — mian kredon,
ke mordaŭ fariĝos
la vivo pli bela,
la vivo pli saĝa.

Sed kiel vi sturmus, mi petas?
Per kugloj?
Ne! Ne konvenas!
Lasu! Ne taŭgas!
Ĝi estas fortike
en kor' kirasita,
kaj kugloj efikaj
por ĝi
ne estas ĝis nun inventitaj!
Ne estas ĝis nun inventitaj!

El la bulgara: Asen Grigorov

Dimitro Denĉev

S T A N D A R D O

Al Nikola Vapcarov

Lia voĉo ŝvebas tra Pirin montaro . . .
Tagon sangan rememoras Bulgario!
Multekosta estas la libero kara,
sed la vivo sen bravuloj estas kio?

Falis li falĉita en la klasbatalo,
sed en la jarcentoj viva, viva restos!
Kaj eterne rakontados la popolo
pri la aglo, kiu mortpafita estis.

Ĉiam bolos la batalo por justeco.
Tempoj ĝisatingos tempojn. La bulgaroj
ĉiam rememoros lian heroecon.
Ĉar la hom'ne povas vivi sen standardo.

EKSTERLANDANOJ PRI

Germaine Yves Farge, *Francio*

El ŝia parolado en la solenaĵo okaze de la premio-enmaniga ceremonio, 1953

Mi estas feliĉa, ke je la nomo de la Monda Packonsilio mi venas ĉi tien por transdoni la diplomon pri la pacpremio, aljuĝita al la granda bulgara poeto Nikola Vapcarov.

En la batalo por libero kaj paco, kiu hodiaŭ estas la plej urĝa tasko de ĉiuj popoloj en la mondo, Nikola Vapcarov restos unu el la plej puraj kaj noblaj figuroj.

Dum sia mallonga vivo, en kiu la poeto kaj la batalanto estas nedisigeble ligitaj, montranta tiom klare la unuecon de liaj politikaj konvinkoj kaj de liaj personaj sentoj, Vikola Vapcarov prikantis kaj defendis la principojn de la libero kaj la homa feliĉo. La bildeca dialogo, elkora kaj pasia, kiun li kondukas en siaj versaĵoj kun sia popolo, faras el la tuta verkaro de Vapcarov vivantan forton. Ĝi ĉiam helpas tiujn, kiuj havas la feliĉon kompreni ĝin.

Mi estas certa, ke ankoraŭ longan tempon la junaj generacioj ĉerpados el lia poezio purecon, profundan kaj aktivigan humanismon kaj moralan forton, kiuj kondukos al plena memferemo por la patrujo. Ĉuste tiel mortis Nikola Vapcarov, fidela al la revolucia pasinteco de la bulgara popolo, kaj restas vera heroo.

Vanda Vasilevska, *soveta verkistino*

El ŝia eldiro en la Kongreso de la Paco, Vieno, 1952

Mi parolos al vi pri du verkistoj — la nacia heroo de Ĉeĥoslovakio Julius Fučík kaj la nacia heroo de Bulgario — Nikola Vapcarov. Ili sigelis per sia sango la verojn, por kiuj ili batalis en siaj verkoj. Cis la lasta spiro ili restis fidelaj al unu sama nobla celo: la artisto devas vivi per la vivo de sia popolo kaj estas necese oferi la vivon por sia popolo kaj por la homaro. La harmonia kunigo de vivo kaj heroaĵo, de vorto kaj faro — tio ĉi estas la belega ekzemplo, kiun ili testamentis al ni. Ni neniam plu renkontos ilin, neniam plu vidos la klaran rigardon de Fučík kaj la mildan rideton de Vapcarov. Sed iliaj verkoj kaj faroj restos. La flamo de ilia parolo estas kun ni kaj akompanas nin. Ili kredis tion, kion ankaŭ ni kredas, ili amis tion, kion ankaŭ ni amas. Ilia afero daŭre vivas, servante al la batalo por libero kaj paco.

NIKOLA VAPCAROV

Richard Palm Dutt, *Britlando*

El lia parolado en la rememora solenaĵo, 1952

Mi ne havas la plezuron legi bulgarlingve, sed eĉ pere de la tradukoj estas ebla eksenti la emocian efikon, la sincerecon kaj la forton de liaj versaĵoj, kiuj konturas la bildon de liaj malfacilaj kaj heroaj tagoj.

Kian riĉaĵon el aliaj geniaj verkoj estus povinta krei Vapcarov, se la faŝistaj ekzekutistoj ne ĉesigis lian vivon!

Sed la riĉan rikolton de liaj vivo kaj morto hodiaŭ rikoltas la bulgara popolo. Vapcarov oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la faŝismo por la libero de sia lando kaj por la afero de la laborista klaso.

Liaj versaĵoj vivos, por bruligi la flamon de revolucia entuziasmo en la novaj generacioj. Lia ekzemplo vivos por instrui kredon kaj forton — neniam kurbiĝi antaŭ la malamiko, batali ĉe ĉiuj cirkonstancoj kun kredo je la venko. La versaĵoj de Vapcarov jam fariĝas konataj en Anglujo kaj estas ŝatataj de la batalemaj laboristoj kaj intelektuloj.

Nikolas Gilen, *kuba poeto*

Nikola Vapcarov estis personeco de monda signifo, giganta kverko, kies radikoj estas en la tero de Bulgario kaj kies trunkoj kaj branĉaro donas ripozon al ĉiuj, kiuj batalas por libero en ĉiuj partoj de la mondo.

Salvatore Quasimodo, *Italio*
laŭreato de Nobelpremio

La italoj ekdezirus, pro tiu ĉi poeto, ekkoni la bulgaran literaturon, ĉiam ankoraŭ nekonatan, kaj ekscii de Vapcarov pri la socia vivo de la homo tia, kia ĝi estis, kia ĝi estas kaj kia ĝi ne estos.



Dediĉe al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj, okazonta en julio 1980 en u. Plovdiv, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas grandan literaturan konkurson. Ĝin povas partopreni ĉiu bulgara kaj eksterlanda esperantisto. La konkursaĵoj povas esti nur en la jenaj branĉoj: originalaj poezio, rakonto, kanto (teksto kaj melodio aŭ nur melodio de E-teksto), eseo, rememoro kaj tradukita poezio. Temoj liberaj.

Limtempo por prezento de la konkursaĵoj: la 1-a de majo 1980 j. (validas la poŝta stampo).

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj aperos en „Bulgara Esperantisto“.

La konkurso estas sekreta. La konkursaĵoj, maŝine tajpitaj, devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiun oni anticipu metu slipon kun la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. La konkursaĵojn kaj la fermitan koverton metu en pli grandan koverton, kaj ĉion sendu rekomendite je adreso:

Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario
(por la konkurso).

Samideanoj, partoprenu amase nian literaturan konkurson!

ДОГОВОР

Между образцово читалище „Иван Владков“ и Есперантско дружество
„Иван Владков“ — гр. Дряново

На основание на договора, подписан между ЦР на БЕС и Комитета на културата — София, ръководствата на Образцово читалище „Ив. Владков“ и Есперантско дружество „Ив. Владков“ — Дряново, се договориха конкретно за провеждане на съвместна дейност.

I. ОБРАЗЦОВО НАРОДНО ЧИТАЛИЩЕ „ИВ. ВЛАДКОВ“ СЕ ЗАДЪЛЖАВА:

1. При откриване на есперантски курсове да излиза с обява съвместно с Есперантското дружество и да му съдействува за привличане на по-голям брой кандидати за изучаване на есперанто измежду служителите и актива на читалището. Читалището да осигурява подходящо помещение за водене на заниманията.
2. Да осигури подходяща витрина за излагане на пропагандни есперантски материали и книги.
3. Чрез своите художествени състави и музикална школа да съдействува за провеждане на съвместни мероприятия.
4. Да се абонира за есперантски списания.
5. Да сложи началото на есперантска сбирка от книги и списания, които да се поставят на щанд в библиотеката.

II. ЕСПЕРАНТСКОТО ДРУЖЕСТВО „ИВАН ВЛАДКОВ“ СЕ ЗАДЪЛЖАВА:

1. Да осигури добре подготвени преподаватели за водене на курсовете и се грижи за организиране и провеждане на същите.
2. Да разпространява из града и района съвместната обява за всеки курс.
3. Да поддържа в добър вид витрината с есперантски пропагандни материали.
4. Да купи за сметка на читалището есперантска литература или да набере от членовете на дружеството такава и я предостави временно за есперантска сбирка в библиотеката на читалището.
5. Да съдействува на читалището при провеждане на мероприятията му.
6. Да стане колективен член на читалището.

1. VIII. 1979 г., гр. Дряново

СЕКРЕТАР НА ОНЧ: П. Попова

ПРЕДСЕДАТЕЛ НА ЕСПЕРАНТСКОТО Д-ВО: Гено Манев



Sofio. La sofiaj e-istoj malfermis la lernojaron per granda publika kunveno en popola legejo „Naturo kaj Scienco“, troviĝanta en la centro de la ĉefurbo.

La kunveno komenciĝis per plaĉa literatura kaj muzika programo, prezentita de la junpionira ensemblo „Verdaj Steletoj“ sub la gvido de Stefka Kalimenova.

Pri la temo „La lingvo de la internacia amikeco“ tre konvinke kaj emocie parolis bulgarlingve Kunĉo Vălev, sekretario de BEA pri la instrulaboro.

Impresojn pri sia unumonata restado en Britlando rakontis Rajna Konstantinova, montrante kolorajn diapozitivojn.

Publika kunveno okazis ankaŭ en kv. Knjaĵevo, kie same prelegis pri E-o K. Vălev.

Tra la tuta urbo estis disgluitaj afiŝoj pri la E-kursoj.

Ĝis nun estas malfermitaj jenaj kursoj por komencantoj: 1 por civitanoj — gvidanto Marin Băcev, 1 por junuloj — gv. Dimitro Denĉev (en la Junulara Domo), 1 por lernantoj — gv. Mariana Elenova, 1 por infanoj — gv. M. Elenov, 1 por instruistoj — gv. Genka Banĉeva, 1 ĉe la Sofiaj Poŝtaj Stacioj — gv. Stefan Meĉkov, 1 ĉe la scienc esplora poŝta instituto — gv. Kolju Markov, 1 en Bulgara E-Kooperativo — gv. d-ro Stojan Moresku, 1 por psogresintoj en la esperantista kanthoro gv. Ljubomir Marikin, 1 por progresintoj — gv. Dimitro Denĉev. En la Sofia Universitato ekfunkciis 3 grupoj por komencantoj kaj progresintoj sub la gvido de la honorariata E-instruanto Kunĉo Vălev. En preparo estas E-kurso en CUM (Centra Universala magazeno), „Profizdat“, kv. Knjaĵevo ka.

„BE“

Dve Mogili. La regiona pedagogia konferenco, okazinta en majo en G. Orjaĥovica, aparte instigis nin aktive eklabori. Dank'al obstina kaj sistema preparo jam ekde majo-junio, ni havas bonan rezulton: la 1an de oktobro ni malfermis elementan E-kurson. La kursanoj estas precipe gejunuloj. Gvidanto — Nejko Nejkov.

Ni laboras kune kun la Patrolanda Fronto kaj la popola legejo.

Nejko Nejkov

Jambol. Ĉi-jare la Distrikta-Urba Estraro de BEA en Jambol pli bone preparis la lernojaron de E-o. Estis presitaj specialaj afiŝoj kaj disgluitaj tra la urbo. En ĵ. „Naroden Drugar“ (Popola Kamarado) aperis kelkaj artikoloj kaj informoj pri E-o kaj la laboro de la e-istoj. Ĉio ĉi helpis por pli granda propagando. La lernojaron ni malfermis per solena kunveno, kiun gvidis Dimitro Ĥristov, vicprezidanto de DUE. Raporton pri la temo „La solvo de la problemo de internacia lingvo per E-o“ faris Dimo Trudoljubov, prezidanto de DUE.

Rezulte de ĉio ĉi aperis 64 kandidatoj por lerni la lingvon. Formiĝis 3 grupoj por komencantoj, kiujn gvidas Penka Papazova, Stojan Popov kaj Dimo Trudoljubov. Aparta kurso estos por progresintoj kun gvidanto Georgi Dimov, diplomita ĉi-jare kiel E-instruisto en Meden Rudnik, Burgas. Post la reveno de la brigadanoj, helpantaj la rikoltadon en la vilaĝmastrumoj, oni organizos elementan E-kurson por la kandidatoj inter ili.

Inĝ. Stojanka Pavlova

Ŝumen. E-societo „Progreso“ en la uzino por ŝarĝaŭtomobiloj „Madara“ bone preparis la novan lernojaron. Ĉi agas ĉiam kune kun la Domo de Kulturo ĉe la uzino.

Oni vaste anoncis E-kursojn, altirante novajn kandidatojn lerni la lingvon, eltrovante ĉiujn, kiuj en pasintaj jaroj komencis lerni, sed pro diversaj kaŭzoj ankoraŭ ne finis tutan kurson.

La laboro de la aktivuloj Petro Nenov, Rangel Gonev, Nikolinka Stojanova, Nadejda Mladenova ka. donis bonan rezulton. La sufiĉa nombro de kandidatoj ebligis formi du grupojn — por komencantoj, sub la gvido de Rajna Stanĉeva, kaj por progresintoj, gvidata de Vasil Georgiev. Ambaŭ gvidantoj estas diplomitoj. La kursojn malfermis Inĝ. Savka Karaivanova — prezidantino de la E-societo. Pri la signifo kaj utilo de la internacia Lingvo parolis R. Stanĉeva.

Cvjatko Todorov

GRANDAN LETERVESPERON en la Semajno de Internacia Amikeco organizas la Sofia Instruista Societo „Diĉo Petrov“. Sendu amike leterojn, bildkartojn. Responde ĉiu sendinto ricevos belan bildkarton. **ADRESO:** Centra Domo de la Instruisto, Esperanto-Societo „Diĉo Petrov“, str. „6 septemvri“ 9, 1000 Sofio, Bulgario.



TRIA KOOPERATIVA KONSULTIĜO EN KUBRAT

Jam forflugis unu jaro de internacia amika paca kunlaborado surbaze de la subskribita kontrakto inter la kolektivoj de konsumkoopertivoj de la bulgara urbo Kubrat kaj la hungara Värpalota.

Lige kun tio je la fino de aŭgusto en Kubrat okazis tria konsultiĝo inter la estraroj de ambaŭ kolektivoj. La delegitarojn gvidis ties prezidantoj Penčo Dakov kaj Kàlmàn Làszlo.

Post tuttaga laboro ambaŭ estraroj unuanime akceptis kaj solene subskribis interkonsenton, kies teksto estas aldono al la kontrakto kaj ĝia nedisigebla parto. Ĝi klare montras la vojon kaj la rimedojn por realigo de la kontrakto. Realigotaj estas la punktoj pri reciproka interŝanĝo de varoj, fakuloj kaj feriontaj laboristoj.

La esperantlingva dokumentaro estis ĝustatempe sendita al la plej altaj instancoj de la kooperativoj, akompanata de bulgara kaj hungara tradukoj.

Fine de la konsultiĝo la prezidantoj de la bulgara kaj hungara kooperativoj promesis unu al la alia, dum la sekvonta, kvara konsultiĝo, interparoli esperantlingve, sen interpretistoj, kaj subteni morale kaj materiale la studadon de E-o en siaj kooperativoj.

Anton Antonov

VEGETARANA E-SOCIETO EN BULGARIO

La problemo pri la nutrado de la homo estas efektive grava. Saĝulo diris: „Pensu bone, laboru bone kaj vin nutru bone.“

La plimulto de la homoj estas viandmanĝantoj, sed estas ankaŭ tiaj, kiuj ne manĝas viandaĵojn. Iuj ne manĝas eĉ laktajn produktojn. Estas ankaŭ krudmanĝantoj. Ĉiuj ĝenerale estas nomataj vegetaranoj. En ĉiuj ŝtatoj estas vegetaranaj societoj kaj organizaĵoj kaj preskaŭ en ĉiu granda urbo estas speciala vegetarana restoracio por vegetaranoj kaj dietuloj.

Estas ankaŭ e-istoj vegetaranoj. Ili de longe estas organizitaj en la Internacia Esperantista Vegetarana Asocio. Ĝia organo estas revuo „Esperantista Vegetarano“.

La 26an de februaro 1979 j. la Buroo de BEA aprobis fondiĝon de Bulgara Vegetarana Esperantista Societo. Al ĝi, malgraŭ nova, jam aliĝis pli ol cent e-istoj el la tuta lando. La societo havas la taskon klarigi al la e-istoj la principojn de la vegetarismo. En Sofio por la membroj de E-Societo „M. Gorki“ ĝis nun estis faritaj kelkaj referaĵoj de V. Anastasov: „Nutraĵo kaj nutrado“, „Pri la vegetarismo“, „La nutraĵo kaj la kanceraj malsanoj“.

V. Anastasov

6A VINTRA AMIKA RENKONTIĜO ESPERANTISTA (VARE)

26—27 januaro 1980, Kubrat, Bulgario

Karaktero: seminaria.

Prelegantoj: eksterlandaj gastoj kaj bulgarioj.

Loko: la Kulturdomo.

Malfermo: je la 15a horo, sabate, 26. 1. 1980.

Fermo: je la 15a horo, dimanĉe, 27. 1. 1980.

Kotizoj: 5 lv. por vespermanĝo kaj 2 lv. por tranoktado.

Aliĝdato: la 5an de januaro 1980.

Pliaj informoj riceveblaj de: *Anton Antonov, Pirin 5, 7300 Kubrat, Bulgario. Hejma tel. 30—38 vespere post la 20a h.*

Rimarkigo: Eksterlandaj gastoj pagos surloke kaj restos laŭvole.

venu are al nia vare!



Kara gasto el GDR

La 13an de septembro ĉe ni en Vraca gastis k-do Alfred Kraushaar — eksredaktoro de la berlina ĵurnalo „Horizonto“.

Lin ligas multjara amikeco kun la E-familio Nadja kaj Ivan Manĉev. Multfoje ni, la membroj de E-societo „Sukceso“, ĝuis liajn enhavoriĉajn leterojn. Dufoje li ankaŭ gastis ĉe ni. Nun li estas honora membro de „Sukceso“.

En societa kunveno k-do Kraushaar longe rakontis al ni pri sia partopreno en la militoj kaj en la itala kontraŭfaŝisma partizana batalo, pri la vivo de sia patrolando, pri la agado de la berlinaj e-istoj kaj ilia partopreno en la konstruado de nova vivo en GDR.

Bona amikeco floras inter k-do Alfred Kraushaar kaj la e-istoj de Vraca.

Katja Marinova

GRAVA POR LA ABONINTOJ

Kelkaj samideanoj plendas, ke al ili mankas apartaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“, kaj ili ne povas bindi kaj konservi en sia biblioteko tutajn jarkolektojn.

La redakcio posedas iujn numerojn de la jaroj 1975, 1976, 1977, 1978, 1979. Ĝi deziras komplezi tiajn samideanojn kaj sendi la mankantajn n-rojn. Do, bonvolu skribi al ni pri tio! Eksterlandaj amikoj sendu laŭeble respondkuponojn por poŝtelspezoj!



La 35a Internacia Junulara Kongreso okazis inter la 20a kaj la 27a de julio en vilaĝeto Austerlitz apud urbo Utrecht (Nederlando). Alta protektanto estis s-ino M.H.M.F. Gardeniers—Berendsen, nederlanda ministro pri kulturo, sporto kaj socialaj aferoj. 350 gejunuloj el 30 landoj partoprenis la kongresajn programerojn. El Bulgario ĉeestis sep personoj.

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER) aranĝis aŭtoritatan seminario, financitan de la Eŭropa Junulara Fonduso kaj UNESKO. Kvindek da ĉeestantoj diskutis detale la kongresan temon „Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?“ Prelegis Humphrey Tonkin (prezidanto de UEA), John Catling (funkciulo de Eŭropa Ekonomia Komunumo), Peter Kuenstler (altranga funkciulo de UNO), Richard Corbett (ĝenerala sekretario de Eŭropa Kunordiga Buroo por Internaciaj Junularaj Organizaĵoj) kaj Akiko Woessink—Nagata (redaktoro de la periodaĵo „UN kaj ni“). Kunvenis kvin studgrupoj, kiuj traktis aspektojn de la temo neesploritajn per la prelegoj. La seminario vekis novan interesiĝon pri problemoj ekster la E-movado kaj montris la strebojn de TEJO al pli viglaj eksteraj rilatoj.

Dum la komitatkunsidoj estis akceptita la norvega landa sekcio kiel membro de TEJO. Oni akceptis novan kongresan regularon, en kies ellaboro partoprenis ankaŭ nia aktivulino Mariana Elenova. Elektigis nova estraro, kiu funkcios dum du jaroj: prezidanto Stefan MacGill (Nov-

Zelando/Nederlando) kaj membroj Jan Jackson (Britio), Michael Lennartz (GDR), Zdravka Metz (Jugoslavio) kaj Bob Venhuizen (Nederlando). Pro meritoj al TEJO oni elektis Sava Tsitirides (Greklando) kiel honoran prezidanton. La komitato decidis, ke la 36a IJK okazu en Rauma (Finnlando).

„Varbato“ (VARba deBATO) allogis 70 kongresanojn, kiuj en kvin grupoj diskutis kiel varbi gejunulojn al E-o. Konkurson „Varbilo de la Jaro“ partoprenis 37 konkursaĵoj, kiuj estis ekspoziciitaj. Oni aljuĝis premion al Serge Sire (Francio) pro propagande farbita aŭtomobilo.

En la kultura programo prezentis sin la nederlanda muzikgrupo „La Pirarbo“ per nederlandaj popolaj kantoj kaj dancoj. Revuo „Literatura Foiro“ refoje aljuĝis la premion „Verko de la Jaro“: ĉi-kaze al la romano „La granda kaldrono“ de John Francis. La pariza E-teatro TESPAS surscenigis la teatraĵon „La fotomaŝino“ de Cocteau. Bona filmvespero informis pri Nederlando. La Internacian Vesperon krom la konataj figuroj partoprenis ankaŭ debutantoj.

La tuttaga ekskurso kondukis al bela urbeto kaj malnovaj muelejoj, sed ankaŭ al granda ekspozicia parko pri agrikulturo.

La programo de la 35a IJK estis ampleksa (i. a. en ok laborgrupoj eblis sporti, aktori, muziki, popoldanci, perfektigi en E-o, eklerni la nederlandan lingvon). La seminario de KER havis bonegan efikon ĉe la eksteraj instancoj.

E. G.

I CENTRA INTERNACIA E-LABORBRIGADO EN HUNGARIO

Ekde la 11a ĝis la 28a de aŭgusto en la sudorienta hungara urbo Bekeŝĉaba okazis unu el la plej amasaj ĝis nun internaciaj E-laborbrigadoj. Ĝin partoprenis 167 gejunuloj (98 virinoj kaj 69 viroj) el 11 landoj: bulgaroj 67 (el 29 urboj), poloj 40, ĉeĥoj kaj slovakoj 19, hungaroj 15, 9 el Jugoslavio, 8 el USSR, 5 el GDR, 2 hispanoj, 1 anglo, 1 rumano. La meza aĝo — 21,4 jaroj. Laŭ socia stato: 40% studentoj, 38% lernantoj, 11,4% laboristoj, 8% instruistoj, 3% inĝenieroj. Estis formitaj 10 labortaĉmentoj.

La brigadanoj laboris en konserva fabriko. Ili purigis paprikojn kaj plenigis kartonskatolojn per konservoj. La komuna vivado kaj laboro unuiĝis ilin.

Dum la ripoztago estis organizita tuttaga ekskurso al la proksime situanta urbo Gyula. Kun vigla intereso oni trarigardis la faman urban fortikaĵon, la muzeon kaj vizitis

naĝbasenon. Kvankam pluvetis, ĉiuj restis kontentaj.

Vespere la brigadanoj okazigis atentokaptajn naciajn aranĝojn. Okazis pola, soveta kaj bulgara distraj vesperoj, dum kiuj la partoprenantoj el la koncerna nacio bonhumorigis kaj amuzis la ceterajn brigadanojn per kantoj, popoldancoj kaj popularaj sondiskoj. Kelkfoje al la brigadanoj gastis hungaraj modernaj muzikensembloj. Dum aliaj vesperoj oni organizis por la dance-muloj disko-aranĝojn.

Post la labortagoj ĉiuj brigadanoj forveturis al la ĉefurbo Budapeŝto. Apud ĝi oni pasigis kvar tagojn en la tendaro Biatorbagi. Tage oni ekskursis al la ĉefurbo. Sub la gvido de hungaraj e-istoj la brigadanoj vizitis la parlamentojn, la reĝan palacon, la planedaron kaj aliajn vidindaĵojn.

T. B.



Survoje al Timiŝoara ni elvagoniĝis en Bukureŝto por veturi tien. La E-flageto flirtis sur mia valizo kaj ni, tri bulgaraj e-istoj, diligente legadis la tabelojn de diversaj vagonaroj. Subite ni aŭdis ekkriion: „Saluton, amikoj!“ Niaj vizaĝoj ekradiis: estis rumanaj e-istoj, kiuj same serĉis la vagonaron al Timiŝoara. Agrabla estis nia dekhora veturado kune kun la rumanoj.

Ĉe la stacidomo en Timiŝoara nin renkontis grupo de lokaj e-istoj frunte kun la universitata profesoro Cezar Apriotesei. Abundis salutoj, brakumoj, kisoj...

Timiŝoara estas bela, pura urbo, kun pitoreskaj konstruaĵoj, multaj el kiuj novkonstruitaj. Kvankam ĝi havas ĉ. 200 000 loĝantojn, ĝia aero estas tre pura kaj freŝa. La stratoj — relative senbruaĵ. La dutaga konferenco okazis en la Universitato. Ĉeestis ĉ. 80 personoj, ĉiuj el Rumanio, escepte de la bulgara grupo. Sekvis salutparoladoj. En la nomo de BEA sulutis Stojan Kostadinov.

El la raporto pri la E-agado en Rumanio evidentiĝis, ke kvankam ne ekzistas landa E-Asocio, la E-movado vekiĝas al nova



Parto de a konferencanoj

vigla vivo. En Timiŝoara ĝi havas solidan bazon. Kelkaj universitataj profesoroj estas estraranoj de la E-grupo. Multe da studentoj lernas E-on. En la urbo ni vidis multajn afiŝojn pri E-kursoj malfermotaj.

Enkadre de la konferenco ni aŭskultis 10 nelongajn prelegojn, ĉeestis riĉan kulturen programon, spektis pupteatraĵon. Je la fino la bulgaraj reprezentantoj invitis la rumanajn e-istojn al la 40a jubilea kongreso de BEA.

S. K.

Letero de amikeco

Kiel ni jam anoncis en n-ro 10 de „BE“, de la 14a ĝis la 19a de aŭgusto Bulgarion vizitis japana delegitaro, sendita de la Societo por Diskonigo de la Vero pri la Atombombadoj de Hiroŝimo kaj Nagasako. La 17an de aŭgusto en la kancelario de Bulgara E-Asocio okazis renkontiĝo, kiun de japana flanko partoprenis s-ro Kimiaki Kurita, prezidanto de la Japana Esperantista Pacdefenda Asocio, s-ro Ikua Senga, MEM-ano kaj aktivulo de la japana pacmovado, fraŭlino Tasko Maeda, juna instruistino el Hiroŝimo, kaj du aliaj personoj, neesperantistoj. De la bulgara flanko partoprenis Hristo Gorov, prezidanto de BEA, kaj Dimitro Haĝiev, prezidanto de la bulgara sekcio de MEM. Post la reveno en Japanion f-ino Meada sendis al k-do Haĝiev leteron kun la jena enhavo:

Kara s-ro Haĝiev,

Nun mi revenis Hiroŝimon. En Sofio mi povis ĝui la tagojn kaj lerni multajn aĵojn dank' al vi, la e-istoj. Mi opinias, ke estas ege grave koni reciproke la pensojn, parolante saman lingvon. Sekve, mi komencis lerni E-on por povi paroli kun vi en E-o.

Mi starigis multajn demandojn al bulgaroj pri la milito, pri Hiroŝimo kaj Nagasako. Ili respondis al mi serioze. Havante antaŭvide iliajn respondojn, mi estas certa, ke la homoj de Bulgario portas la ideon pri la paco profunde en siaj koroj.

Mi kunsendas al vi kopion de la pentraĵo de via profilo. Mi opinias, ke vi aspektas multe pli bela ol en la pentraĵo, ĉar mi faris ĝin haste.

Mi esperas, ke vi venos en Japanion, kaj mi povos bonvenigi vin en Hiroŝimo.

Sincere via: Maeda

LETERVESPERO

Esperanto-kurso por komencantoj en urbo Rostock aranĝos je la 15a de januaro 1980 letervesperon. Ni petas, sendu viajn koresponddezirojn kaj ni serĉos korespondanton por vi. Skribu al abreso: Kulturligo de GDR, Kröpelin Str. 25, Esperanto-fako, 2500 Rostock, GDR. Ni garantias respondon!



Ĉi-jare nia aktivulino Rajna Konstantinova notas sian 60-jariĝon. La sófia esperantisto bone konas kaj amas ŝin kiel afablan kaj tre komplezeman samideaninon.

Konstantinova emeritiĝis kiel oficistino en la Bulgara Banko por Ekstera Komerco en Sofio. Pro sia diligenta modela laboro tie ŝi havas multajn distingojn kaj premiigojn per honorinsignoj, diplomoj, titoloj, monsumoj ka. La Popola Registaro honoris ŝin per la ordeno „Patrino Gloro“. BEA ornamis ŝian bruston per sia ora insigno.

R. Konstantinova estas neordinare sciamma. Aparte ŝi ŝatas la lingvojn. Jam mezaĝa ŝi foreste studis en la Universitato germanan kaj rusan filologiojn, ellernis aŭtodidakte anglan lingvon. Sian koron ŝi tamen dediĉis al Esperanto, kiun ŝi eklernis en la lasta klaso de la gimnazio kaj ekde tiam aktivis seninterrompe en la vicoj de la bulgara E-movado. Longe ŝi estis sekretario de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj (IUEF), laboris en la Sofia literatura Rondo. Antaŭ la sofiaj e-istoj ŝi faris multajn, ĉiam tre interesajn prelegojn, kiujn oni plezure aŭskultas kaj longe memoras. En multaj E-revuoj estas publikitaj ŝiaj bonaj tradukoj („Nuntempa Bulgario“, „Paco“, „Bulgara Esperantisto“, „Interligilo“, „Kolektanto“ ka.). Akurate

Konstantinova laboras en „Scienca Mondo“, por kiu ŝi tradukas el germana kaj angla en E-on. Kelkajn jarojn ŝi korektas „BE“ kaj „Pacon“, lernolibrojn, broŝurojn ka.

Sed plej grava estas ŝia literatura agado. Konstantinova tre facile verkas. Ŝi posedas la kapablon bone observi kaj kapti eĉ plej etajn trajtojn de homoj, bestoj, objektoj, faktoj kaj eventoj, kio ebligas al ŝi sukcese pentri la multkolorcon kaj varieton de la vivo. Ŝia stilo estas facila, ekonomia kaj klara. El ŝia tuta verkaro ŝprucas pura sincereco, nobla simpatio al la ordinara laboruloj, hela humanismo. Konstantinova amas ĉion vivan — kaj homojn, kaj bestojn, kaj plantojn. Ŝi estas ĉiam preta helpi la suferanton. La bonfaremo estas esenco kaj de ŝia vivo, kaj de ŝia literatura verkaro. Vere, ŝi malmulton ĝis nun publikigis. Tamen eĉ el tio malmulto evidentas riĉa animo, malavare dotita krea personeco. La legantoj de „Bulgara Esperantisto“ certe ĝuis ŝiajn rakontojn „Mia verda papageto“ (en n-ro 7/1978), kiu gajnis la premion Simondetti, kaj „La eta ruĝa albumo“ (en n-ro 7—8/1979), premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA (1978). Ĉi-jare en la samaj konkursoj ŝi gajnis la premion „Nova talento“ pro la novelo „Promeno en la infanecon“. Do, ŝia nomo estas jam gravurita sur la arĝenta „Pokalo Harabaĝiu“. Ni kredas, ke ekde nun niaj legantoj pli ofte havos la eblecon ĝui la fruktojn de ŝia talento.

Nur antaŭ du monatoj R. Konstantinova faris prelegvojaĝon en Anglio laŭ invito de la elstara E-poetino d-rino Marjorie Boulton (Margori Boltân). Ŝi gvidis konversacian rondon enkadre de la Someraj E-Kursoj en Barlaston, kies direktorino estas s-nino Boulton, kaj faris tie tri bonajn prelegojn: „1300 jarojn bulgara ŝtato“, „Ivan Vazov — klasikulo de la bulgara literaturo“ kaj „Internacia Infanasembleo Standardo de la Paco“. La samajn prelegojn ŝi faris ankaŭ en Oxford (Oksford) kaj Southampton (Sauthamptân). Pro ŝia bona lingvaĵo kaj E-prononco oni surbendigis la tri prelegojn. K-dino Konstantinova estis intervjuita de radio Stoke-on-Trent. Informon pri ŝia gastado kun foto aperis en ĵurnalo „Evening Sentinel“.

Ni gratulas la karan jubileulinon kaj bondeziras al ŝi sanon, pluajn literaturajn sukcesojn kaj la saman neestingeblan entuziasmon pri E-o kiel ĝis nun.

K. Vălev



ALEKSANDRO ZILBERNIK — LA BOPATRO

Aleksandro Lejboviĉ Zilbernik (la bopatro de d-ro L. L. Zamenhof) naskiĝis en 1831 en Vieĥŝniai, distrikto de Vilnius, Rusujo, kaj mortis la 25an de matro 1906 j. en Varsovio. Lia patro, Lejb Sah, estis libera rabeno en la hebrea komunumo. La familian nomon Zilbernik li ricevis pro jena okazintaĵo. Por eviti militservon liaj gepatroj turnis sin al la seninfanaj gepatroj Zilberfenig kun peto, ke ili adoptu la infanon (laŭ la rusaj leĝoj nura filo en la familio estas libera je militservo). La rusa oficisto enskribis la infanon Sah erare: anstataŭ Zilberfenig skribis Zilbernik. La infano studis en Jeŝivot (supera rabena lernejo) kaj aŭtodidakte studis rusan kaj germanan lingvojn. Li edziĝis al la filino Hadasa de la riĉa kaj honesta familio Bjeloĥ en Bjalistoko, poste translokiĝis en urbon Kovn (Kaunas) kaj kune kun J. Sĉeranskij fondis fabrikon de sapo, kiun ili ambaŭ gvidis 47 jarojn en plena harmonio.

Zilbernik havis kvar filojn kaj kvin filinojn. La plej juna filino Klara (6. okt. 1863—6. dec. 1924) edziniĝis la 9an de aŭgusto 1887 al L. Zamenhof.

Zamenhof finis la kreadon de Esperanto en 1885 kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis aŭdi pri E-o, ĉar ekzistis jam lingvo Volapük, neniu volis riski eĉ malgrandan sumeton da mono por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn de E-o en la rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. A. Zilbernik donis 10 000 rublojn, kiujn Zamenhof elspezis por la presado de E-lernolibroj kaj ilia senpaga dissendado al redakcioj, lernejoj, profesoroj, kuracistoj, diversaj societoj, por

multaj anoncoj en diversaj gazetoj ktp. En 1888 Marko Zamenhof, patro de L. Zamenhof, estis minacita de granda puno. Por eviti la punon L. Zamenhof donis al sia patro la restintajn 5000 rublojn kaj mem restis sen mono. Zamenhof savis la patron, sed mem ruiĝis por ĉiam. Liaj enspezoj estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj. A. Zilbernik subtenadis sian bofilon Zamenhof dum 15 jaroj. Li kredis al lia ideo, tuj post la apero de E-o (26 julio 1887) ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia neĵuna aĝo, fariĝis fervora e-isto kaj korespondadis kun alilandaj samideanoj. Zilbernik subtenadis la bofilon ne nur materiale, sed ankaŭ morale. Li konsoladis lin ĉiam, kiam la esperoj komencis malfortiĝi. Zilbernik havis ĉiam grandan amon kaj intereson al la E-afero. La lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj troviĝis sur lia skribotablo antaŭ la morto, estis Esperantaj.

A. Zakrzewski en „Historio de Esperanto“, 1913 j., kaj E. Privat en „Vivo de Zamenhof“, 1920 j., biografoj de L. Zamenhof, eĉ per unu vorto ne menciis la nomon de A. Zilbernik.

A. Zilbernik estis la unua mecenato de E-o. Al li la e-istoj multe ŝuldas, ke E-o aperis en la mondon, ke ĝi povis trapasi la plej malfacilajn jarojn de sia ekzisto.

En Pazu gatve (=Pazu-strato) en Kovno Zilbernik havis domon. En 1925 Pazu gatve estis nomita Zamenhof-gatve (=strato de Zamenhof). En 1941 la germanaj hitleranoj, okupintaj Litovujon, sovaĝbeste detruis la stratabulon.

Adolf Holzhaus, Usono



**REMEMOROJ PRI LA E-VIVO EN LA
PEDAGOGIA LERNEJO DE LOVEĈ**

En la pedagogian lernejon de Loveĉ mi, Elena Dragolova, venis en la lernojaro 1926/27 post kruelaj turmentoj en la polico kiel sekretario de Komsomolo en Sevlievo kaj post juĝo laŭ la draka faŝista Leĝo por Defendo de la Ŝtato. Post amnestio mi estis ricevinta la rajton daŭrigi la lernadon en alia lernejo.

En Loveĉ tiutempe la atmosfero estis tre varma. En la ĉirkaŭaĵo agadis la taĉmentoj de la legenda Vasil la Heroo kaj Tinko Simov, kiuj ne permesis trankviligon de la potenculoj. Konstante blokadoj, pafadoj, amasaj arestoj, torturado de la arestitoj.

El la vilaĝoj oni ofte eskortadis grupojn de homoj suspektataj kiel helpantoj de eksterleĝuloj. En la grupoj iam estis ankaŭ infanetoj kun palaj, timigitaj vizaĝoj. La tuta urbo estis en la tenaĵo de polica blokado; oni ne permesis al la homoj eliri al la kamparo. En la aŭtuno de 1926 j. la vinberoj restis nerikoltitaj.

En la lernejo tamen, kiel en oazo, estis iom mola, progresema atmosfero. Instruistoj kaj lernantoj akceptis min bone, por ne diri bonege. Kelkaj el la instruistoj estis malkaŝe progresemaj homoj — Vojnovska, Ivan Ĉudoto, precipe d-ro Vasilev k.a.,

Inter la lernantoj bolis vigla ideologia laboro. En la studrondo de literaturo, gvidata de Vojnovska, ne hazarde oni traktis „La Rabistojn“ de Siler, „Ĉajld Harold“ de Bajron ka. Jam en la unuaj tagoj de mia estado en la lernejo mi faris eldiron pri Siler, kaj ekparolinte pri Karl Moor, mi inspiriĝis kaj kuraĝigata de la rideto de Vojnovska diris multajn liberajn pensojn. Poste kaj mi, kaj miaj proksimuloj ektimis. Vere mi povis denove elflugi el la lernejo. Tio tamen ne okazis. La spirito de la lernejo estis progresema.

Fortan influon en la lernejo havis la E-societo. Unu el ĝiaj plej aktivaj membroj estis Pavel Bozarov. En la societo aktive laboris ankaŭ Atanas Dimitrov, Petko Miĥajlov, Nino Besolov, Ĥristo Dragolov (veninta forpelite el la gimnazio de Sevlievo), Todorka Zagorova, Todorka Staneva, Mara Staneva, la skribanta ĉi tiujn liniojn Elena Dragolova, kiu gvidis E-kurson por lernantinoj. Nia gvidanto flanke de la lernejo estis Fenenko, ruso-blankgvardiano. Ni ne povis havi pli taŭgan respondeculon. Fenenko ne komprenis E-on, estis iom malsaĝa, ni ĉiam povis fortiri lian atenton kaj paroli kion ni deziras. Li fakte servis al ni kiel vando, sub kies ŝirmo ni povis fari nian junkomunistan laboron. En la centro de tiu laboro estis Pavel Bozarov.

En iu momento ni sukcesis ekhavi kontakton kun soveta e-isto, maristo el Omsk ĉe rivero Ob. Tion faris Todorka Zagorova, kiu trafis lian adreson en iu usona E-revuo. Ni tuj sendis leteron. En sia respondo la soveta maristo skribis, ke kiam nia letero alvenis, li estis en ŝipveturado. Reveninte li estis grupe renkontita de siaj amikoj, kiuj kurante kriis al li kaj svingis la leteron. Li tralegis kaj tradukis ĝin. Poste tiomfoje li devis fari tion antaŭ aliaj junularaj grupoj, ke vere estiĝis necesa preni zorgojn por preventi difektiĝon de la kara letero pro multa uzado. Tiel granda estis la intereso al Bulgario en Sovetunio. Mi ne memoras, kion ĝuste ni skribis, nur mi scias, ke ni ne avaris priskribante la veran situacion en nia lando tiutempe. Kun ne malpli granda intereso ni renkontis la leterojn de la maristo, kiuj vekis viglecon kaj ĝojesperojn ĉe ni.

Kelkajn leterojn ni interŝanĝis ankaŭ kun la ukraina e-isto A. Tincer. Bedaŭrinde ne post longa tempo tiu ĉi vojo estis ĉesigita. Verŝajne la reakcia potenco ekflaris nian korespondadon.

Kun kia hela ĝojo Pavel ektuŝis la leterojn, kiujn ni disponigis al li!

En la printempo de 1927 en la nomo de la E-societo ni preparis amuzvesperon kun programo nur en E-o. Nia societo estis nomata „Batalo kaj Venko“ Fenenko tamen prononcis ĝin „batalo kaj hajvenko“, pro kio ni ĉiam ridis. La afiŝoj jam estis pre-

sitaj, la amuzvespero anoncita. Ni havis lastan kunvenon antaŭ la grava aranĝo. Sed Fenenko venis kolera. Verŝajne li estis ricevinta signalon de la potenco aŭ de lernantoj-skoltoj, kiuj kvankam malmultaj, tamen ekzistis en la lernejo. Unue li firme insistis, ke ni ŝanĝu la nomon de la societo, ĉar la nuna nomo estas komunista. Due, li insistis, ke la amuzvesperon ni faru kune kun la skoltoj. Tio jam estis vera provoko. La kunveno akre protestis. Eldiris kontraŭan opinion Atanas Dimitrov, Ĥristo Dragolov (kiun Fenenko, jam ege pli kolera, forpelis el la kunveno) ka. La parolon prenis Todorka Zagorova. Unue ŝi esprimis la proteston de la kunveno pro la forpelo de Dragolov. Se oni devas iun forpeli, tion devas fari la kunveno kaj ne Fenenko. Poste ŝi defendis la nomon de la societo, dirante, ke oni batalas kontraŭ la sovaĝa naturo, kontraŭ la malbono en la vivo ktp. — ion en tiu spirito. Kaj pri amuzvespero kune kun la skoltoj oni ne povas eĉ pensi — la programo estas jam preta, la afiŝoj ankaŭ disgluitaj. La ĉeestantoj per replikoj kaj interjekcioj vigle aprobis la vortojn de Todorka. Tio tute frenezigis Fenenkon. Li komencis krei kaj ekiris al ŝi.

— Delonge mi scias, ke ci moviĝas kun cent kilometroj hore kaj brulas kun temperaturo de kvardek gradoj... For!

Kaj provis kapti ŝin. Li havis abomenan, iel sendignigan manieron forĵeti la lernantojn eksteren. Etendadante du fingrojn, kaptadis la veston je la ŝultro kaj ŝajne tuŝante ion senfine naŭzan forĵetadis la lernanton eksteren. Sed kiam li etendis siajn fingrojn al Todorka, ŝi ekkriis:

— Ne kuraĝu tuŝi min! Mi mem eliros!

Kaj forlasis la kunvenon. En la unua momento Fenenko ekhaltis, sed poste donis liberecon al sia kolerego, disŝiris la statuton de la societo kaj aliajn parerojn. Laŭ donita de Pavel signalo la tuta kunveno forlasis la halon. Fenenko restis sola furiozi kaj insulti, kio en lia malbona bulgara parolmaniero estis tre ridinda.

Sekvis traserĉojn en la loĝejoj, enketoj, pridemandoj kaj ofendoj ĉu de la polico, ĉu fare de la lerneja estraro, kiuj daŭris monatojn. La kunveno okazis en la komenco de marto kaj la esplorado finiĝis en majo. Rezulte: el la lernejo estis eksigitaj Atanas Dimitrov, Ĥristo Dragolov, Todorka Zagorova kaj Elena Dragolova (malgraŭ ke tiu lasta pro taktikaj konsideroj nenion diris dum la kunveno). La eksigo okazis la 6an de majo, do nur 18 tagojn antaŭ la 24 de majo, kiam finiĝas la lernoĵaro por la abiturientoj.

Kiel komplete kaj ame rilatis Pavel al la eksigitoj! Li kvazaŭ hontis esti en la grupo de la malpeze punitaj.

Kun Pavel mi renkontiĝis kelkajn jarojn poste, ĉe la geedziĝa festo de Todorka,



kaj ni pasigis kelkajn tagojn kune. Estis ebleco rememori multon kaj, kiel ordinare okazas, ni ĉion rigardis de ĝia komika flanko. Aparte ni ridis rememorante, kiel ni sukcesadis trompi Fenenkon.

Post la 9a de septembro 1944 ni renkontiĝis kun Pavel en Sofio, jam plenaĝuloj, kun po tri infanoj. Niaj familioj interami-

kiĝis, ni vizitadis unu la alian, promenadis amike kunestis.

Pura homo estis Pavel, hela animo, malprofite fidela al la ideoj, por kies triumfo tutan vivon li laboris kaj batalis.

*Elena Dragolova,
Todorka Zagorska*



La 7an de aŭgusto forpasis k-do Pavel Bozarov — aktiva batalinto kontraŭ la faŝismo, rezerva kolonelo de la Popola Armeo, eksa instruisto kaj unu el la fondin-

AKTIVA BATALINTO

toj de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“.

Pavel Bozarov estas naskita en v. Pravc, distrikto Sofio, en 1910 j. Kiel lernanto en la gimnazio de u. Orhanie (nuna Botevgrad) en 1924 li lernis E-on. En la lernojaro 1925/26 en la gimnazio estis fondita lerneja E-Societo „Verda Radio“, kies aktiva membro Pavel fariĝis. La societo disvolvis vastan propagandon de la Internacia Lingvo inter la lernantoj kaj subtenis intimajn rilatojn kun la fondita tiutempe Lerneja E-Unuiĝo, disvastigis revuon „Esperantista Junularo“ kaj en la printempo de 1926 j. sendis delegitojn al la konferenco de tiu unuiĝo en Veliko Târnovo.

Dum la sekva 1926/27 lernojaro Pavel Bozarov estis lernanto en la Pedagogia Lernejo de Loveĉ. Tie li tre aktive laboris en la vicoj de E-Societo „Batalo kaj Venko“.

En la sekva 1927/28 j., malgraŭ la forta bato de la reakcio al la societo, Bozarov daŭrigis sian E-agadon en la lernejo. Li priagitis multajn lernantojn viziti la kongreson de la bulgaraj e-istoj en la somero de 1928 j. en u. Vraca.

Ĝis la 9 de septembro 1944 P. Bozarov estis popola instruisto, post tio eklaboris en la popola armeo. Ĉiam kaj ĉie li estis bona propagandanto de nia lingvo kaj afero.

V. Boz.

Forpasis 76-jra en Simitli

Vasil Padejki

E-veterano, membro de E-Societo „Espero“ en Blagoevgrad, sindona e-isto, gvidanto de multaj E-kursoj, arda pacbatalanto:

Niajn kondolencojn!



Verdaj steloj

Rajna Konstantinova

Forpasis jam tiu grava evento, per kiu nia lando donis valoran kontribuon al la Internacia Jaro de la Infano. Ĝin oni povas forgesi neniam. Mi volas ĉi tie tuŝi nur kelkajn momentojn el la Asembleo.

Prepare al ĝi ĉiuj infanoj konkursis en siaj landoj en la sfero de plastika arto, pentrado, muziko (propraj komponaĵoj aŭ plenumo de famaj komponaĵoj), literaturo (poezio kaj prozo). La infanoj en fremdlando konkursis por la unuaj dek premioj, kiuj ebligis al ili personan senpagan partoprenon en la Asembleo. La konkursoj estis rigoraj kaj objektivaj, pri kio atestas la alta nivelo de la premiitaj verkoj. Ili restos kiel donaco al la bulgaraj infano kaj oni konservos ilin en tri grandaj haloj en la Palaco de Pioniroj en Sofio sub la nomo „Nacia Fonduso Infana Kreado“. Premiitaj estas entute 10 200 verkoj, el kiuj 3200 pentraĵoj.

Nia ŝtato faris multajn specialajn aranĝojn por la infanoj lige kun ilia Internacia Jaro kaj lige kun la Infanasembleo. Jen kelkaj el la plej neforgeseblaj.

Tramo de la fabeloj. Ekde la 4a de julio ĝis la 30a de septembro laŭ la ĉefstratoj de Sofio, tra la plej longaj distancoj, veturis flava tramo, pitoreske desegnita per fragmentoj el popularaj fabeloj. Ĉiuj infanoj, naskitaj post la jaro 1965, veturis per ĝi senpage. La „Ruĝa Ĉapeleto“ aŭ alia konata heroo el fabeloj, en konvena kostumo, kun teko transŝultre, proponis al la etaj pasaĝeroj anstataŭ bileto koloran bildon el iu fabelo. Kunveturis infanverkistoj, kiuj subskribis la librojn, aĉetatajn de la infanoj. En la tramo troviĝis la „Fabela

FACETOJ DE LA INTERNACIA INFANASEMBLEO „STANDARDO DE LA PACO“


Libro“, titolita „Kion mi farus, se mi subite transformiĝus en sorĉiston“. Jen kion skribis en ĝi okjara infano: „... sorĉus la kanonojn, por ke iliaj faŭkoj elputu ne morton, sed kolombojn, ludilojn, ĉokoladon...“ Alia skribis: „Mi sorĉus la plenkreskulojn fariĝi bonaj kaj ne mortigi nin, sed sekurigi al ni sanan kaj feliĉan infanecon...“

Kantanta vagonaro. Ĝi konsistis el ok vagonoj, en kiuj dum sep tagoj (ĝis la 14a de aŭgusto) traveturis la landon cent infanoj de fervojistoj. Por ili tio estis premiigo pro ilia sukcesa partopreno en la konkursoj de la Asembleo. Ĝis la vagonaro veturigis ilin la „Tramo de la Fabeloj“. Lokomotivestro estis Minčo Minĉev, kiu krom tio ĉi estas ankaŭ poeto, honorita per la granda literatura premio „Vladimir Baŝev“, kun eldonitaj ĝis nun du volumoj da poezio. La infanoj portis enmane ruĝajn rozojn kaj blankajn kolombojn. En la tago, kiam antaŭ 34 jaroj falis sur Hiroŝimon la fatala atombombo, preninta ĝis nun 95 685 viktimojn, el fervojstacio Sofio majeste ekmoviĝis la speciala vagonaro... Eksonis infana kanto, senĝena kaj senzorga. En tiu momento ducent manoj de infanoj malfermiĝis kaj al la lazura ĉielo forflugis cento da blankaj kolomboj — simbolo de la sopirata paco... Kun la ritmo de la radoj plue sonis la vigla infana kanto, sonis la impeto al hela estonteco, la strebo al beleco kaj perfekteco.

Infanludiloj. En la tagoj antaŭ la Infanasembleo la specialigitaj entreprenoj ellaboris super la plano 150 000 interesajn infanludilojn kaj disponigis parton de ili por donacoj al la assembleanoj. Ili ellaboris ankaŭ 6000 „uniformojn“ kaj po du diversaj tekoj por la infanoj.

Albumoj. Ĉiu infano ricevis po tri albumoj, enhavantaj la premiitajn verkojn — pentraĵojn, versaĵojn, komponaĵojn. Estis ankaŭ speciala albumo, kiu enhavis bondezirojn al la Asembleo, skribitajn en naciaj lingvoj fare de la partoprenintoj en la Dua Internacia Renkontiĝo de Verkistoj en Sofio (junio 1979).

Jubilea ormonero. La bulgara ŝtato kiel gastiganto de la Asembleo prenis sur sin taskon distribui, kun la helpo de UNICEF, la eldonitajn de 30 ŝtatoj arĝentajn monerojn. Krom tio Bulgario kune kun dek aliaj ŝtatoj decidis eldoni ankaŭ jubilean ormoneron, reprezentantan infanon, kiu ludas per popola instrumento. Ĉirkaŭ ĝi infanoj rondodancas. Sur la alia flanko — la ŝtata blazono.



Specialan **mozaikan panelon** donacis al UNESKO la pioniroj de urbo Burgas. Ĝi estas ellaborita de kvin infanoj kaj prezentas la terglobon. Ĉirkaŭ la terglobo, simile al petatoj de floro — kvin diverskoloraj infanaj kapetoj. UNESKO edlonis kun tiu motivo novjaran salutkarton, kaj la Ministerio de la Poŝtoj en Bulgario eldonis poŝtmarkon.

Infana kinoteatro estis inaŭgurita en u. Blagoevgrad, vizitata senpage de la infanoj.

Ankoraŭ multajn aliajn aranĝojn efektivigis nia ŝtato, por sekurigi al la infanoj el la tuta mondo ĝojon, ĝuon, agrablan distron, sukcesan manifeston de iliaj kapabloj.

Aparte kortuŝa estis la decido de la ŝtatoj-partoprenantoj sendi al Bulgario donace **sonorilegojn**. Kaj jen alvenis Sofion 84 sonoriloj diversspecaj: el kupro kaj stano, el „kantanta bronzo“, el arĝento. La plej eta estas arĝenta kaj similas lernejan sonorileton. La plej impona — el Meksikio, kupra. Ĝi havas surskribon: „Al bulgaraj infanoj de la infanoj de Meksikio.“ En tiu lando konkurso 675 000 infanoj por dek premioj: partopreno en la Asembleo en Bulgario! Ili kunportis ekspoziciojn kiel donacon por la bulgaraj infanoj.

Al la ricevataj 84 sonoriloj Bulgario aldonis sian plej grandan sonorilegon, 1300-kilograman, nomatan „Bulgario“, sur kiu estas gravurita la jaro 1979, kaj ankoraŭ 180 sonorilojn. Fakuloj konstruis majestan monumenton „La voĉoj de la popoloj“ kaj aranĝis la sonorilojn tiel, ke en la tago de la inaŭguro ili dum kvar minutoj kantis tri popularajn kantojn: „Estu ĉiam la suno!“, „Se ĉiuj infanoj en la mondo“, „Se vi min demandus, kie . . .“ (tiu lasta de Ivan Vazov). Inter la kantoj aŭdiĝis motivoj el „Odo al la Ĝojo“ de Beethoven. . .

Blankan elefantidon de ina sekso donacis al la bulgaraj infanoj la infanoj el Hindio, ŝtato Karnatoki—Bangalor. Ŝi pezas 800 kilogramojn, estas nur 6-monata kaj veturis al Bulgario per ŝipo. Ŝia nomo estas „Beti“, sed oni proponas bapti ŝin „Hindio“.

Multaj premiitaj versaĵoj de infanoj el la tuta mondo estis daŭre publikataj dum la tagoj de la Asembleo, sed min aparte impresis unu el ili, verkita de la vjetnama knabino Nguen Ĉung-ha. La versaĵo havas jenan sencon:

KONVESACIO KUN LA PUPO

„Kiel bela vi estas, eta pupo! Viaj okuloj estas bluaj, la haroj — helaj. Kiel donaco vi ekveturis de ie el la mondo por vjetnamaj

amikoj. Ho, ĉarma eta pupo, de kie vi estas? Ĉu de Sovetunio, de Kubo, de Bulgario aŭ de Ĉeĥoslovakio? — La pupo ridetas kaj nenion povas diri. Mi komprenas — tio estas pro emocio. Kiel mi amas vin, kara pupo!“

Simile al ora ĉeno pasis la suno- kaj amoplenaj dek tagoj de la Infanasembleo. La infanoj certe rememoros ĝin dum sia tuta vivo kiel ĉarman fabelon.

Antaŭ ol forveturi al siaj patrolandoj, la 24an de aŭgusto, la infanoj vizitis la Parlamentejon en Sofio, kie ili akceptis kortuŝan „Leteron-Alvokon“ al la infanoj de la tuta mondo kaj per UNO — al la tuta homaro. Ili akceptis ĝin starantaj, kantante la faman packanton „Estu ĉiam la suno!“ Jen kelkaj fragmentoj el la Letero-Alvoko:

„Patrinoj kaj patroj, fratinoj kaj fratoj, Sofio, la ĉefurbo de Bulgario, kolektis niajn korojn en unu flamon kaj la fajreroj de tiu flamo ekflugis tra la mondo por stimuli la unuecon, la kreadon kaj la belecon. . .

Ni estas nur mil etaj senditoj, sed ni memoras, ke nin sendis du miliardoj da infanoj, kiuj loĝas sur la planedo Tero en tropika sunvarme kaj en polusa frosto, en helaj ĉambroj aŭ sur nudaj ŝtonoj. . .

Ni aŭdis la voĉon de la sonoriloj, senditaj por nia festo el tiom da anguloj de la mondo — sonoriloj mulditaj el fero, arĝento, kupro, oro, sonoriloj nigraj, blankaj, ruĝaj kaj flavaj; kaj ni vidis, ke ankaŭ ni, kiel la sonoriloj, estas fere nigraj, arĝente blankaj, kupre ruĝaj kaj ore flavaj. . . La voĉo de la sonoriloj kunfandiĝis en unu sonon kaj la ĝojo pro la komuna kanto plenis la vastaĵon, la flama alvoko malfermis la korojn, kaj la vibroj de niaj voĉoj kunfandiĝis en la monolitan ĥoron de la komunajo.

Ni komprenis, ni scias, ke kvankam ni estas infanoj el 80 landoj, el ĉiuj rasoj, el diversaj popoloj kaj kulturoj — ni estas homoj kolektigitaj sur la tero por vivi kaj vojaĝi kune al la estonteco. . . Kaj ni atestas: la beleco estas en la unueco, la ĝojo estas en la streboj kaj la eblecoj de la estonto, la tero estas komuna, la kosmaj radioj lumigas la mondvastaĵojn kaj ĉiu povas ilin respeguli, la suno estas nia, ĉies.

Patrinoj kaj patroj, gardu la ĝojon de la homa komunajo! . . . Ni ne deziras kredi, sed vi scias, ke ĉiutage sur la tero mortas pro malsato okdek mil infanoj. Ĉiutage okdek mil de ni — la estonto de la homaro kaj de la planedo. Ĉu tio estas ebla? Ni demandas: kiel vi, niaj gepatroj, povas toleri, ke la beleco estu krucumata kaj ke oni forprenu la leĝan rajton de niaj gefratoj ĝui la sunon? Ni — estonto de la planedo, havas la rajton demandi kaj insisti: donu al ĉiuj infanoj en la mondo sufiĉe da pano,

ridetoj kaj koloraj kraĵoj, stimulu la strebon kaj la laboron de la kreantoj...

Patrinoj kaj patroj, fratoj kaj fratinoj, ni, la infanoj de la planedo, adresas nin al vi:

Amikoj el la tuta mondo, etendu viajn manojn en la nomo de la unueco, de la beleco kaj la harmonio — estu kreantoj, aŭdacaj kaj impetantaj al la estonto, kaj sciuj — nia estas la suno!"

LA INFANOJ DE ŜUMEN PENTRAS

Infanoj, membroj de E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen, partoprenis en la konkursoj pri infandesegnaĵoj en la urboj Gjöteborg (Svedio) kaj Barcelono (Hispanio).

La pentraĵo de la 8-jara Ivajlo Todorov je temo „Mia patrolando — roza ĝardeno“ estis distingita per laŭda mencio inter la pentraĵoj de 400 infanoj el 16 landoj, en ekspozicio okazinta en Barcelono.

Laŭ peto de la E-grupo en u. Tihvin, Leningrad-regiono (USSR), la Distrikta Estraro helpe de la E-instruistino Toderka Kandilarova kolektis kaj sendis 35 pentraĵojn de 6—12-jaraĝaj infanoj el Ŝumen. Tie ili havis lokon en internacia ekspozicio de infanoj-esperantistoj.

Cv. T.

RENKONTIĜO DE E-FAMILIOJ

Enkadre de la dua internacia Medicina E-Konferenco en Hungario okazis renkontiĝo de e-istaj familioj, kies ĉefa organizanto estis nia hungara s-ano Ernjo Cisar.

La renkontiĝon partoprenis 6 familioj el 3 landoj (ĈSSR, Hungario, Pollando: 13 gepatroj kaj 12 infanoj de 3 ĝis 10-jaraj. Dum la renkontiĝo oni povis tre malofte aŭdi nacian lingvon. La infanoj kreis bonan Esperantan etoson kaj ludis kune, uzante la Internacian Lingvon ne nur dum la antaŭtagmezaj „devigaj“ okupoj, sed ankaŭ dum la liberaj horoj posttagmeze kaj vespere, eĉ dum petoloj kaj kvereloj.

Jen ekzemplo pri mia plej malgranda 4-jara filino Veronika. Antaŭ la renkontiĝo ŝi malofte parolis en E-o, kvankam komprenis ĝin tre bone. Post kelktaga restado en Hungario kaj partopreno en la renkontiĝo ŝi eĉ nokte en la dormo komencis paroli E-e kaj ĝis nun, jam monatojn post la renkontiĝo, tre volonte uzas E-on, rakontante pri siaj travivaĵoj.

Ni adiaŭis nin kun forta deziro renkontiĝi denove post unu jaro, verŝajne en Sombathej, Hungario.

Ni ĝojos kontaktiĝi kun aliaj esperantistaj familioj. Skribu al: Ernő Csiszar, Kulich Gyula ut. 25.V.16, H-8100 Varpalota, Hungario.

St. Pochanke

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ NASKITAJ EN NOVEMBRO

La malalta kulturo malproksimigas nin de la popola muziko, la alta kulturo proksimigas nin al ĝi.

Asen Razcvetnikov, poeto (2. 11. 1887 — 30. 7. 1951)

Ne ekzistas malfeliĉo, kiun oni ne povas elteni; eĉ la plej terura, kiun ni povas timi, traktante nin provokas en nia animo koncernan energion, por ke ni eltenu kaj eltoleru ĝin.

Konstantin Veliĉkov, verkisto kaj sociaganto (. . . 1885 — 3. 11. 1907)

La ĵaluzo postvivis ankaŭ la plej fortan amon kaj povas turmenti la homon eĉ en plej profunda maljuneco.

La malfeliĉo venas ĉiam neatendite.

Jordan Jovkov, verkisto (9. 11. 1880 — 15. 10. 1937)

La sklaveco estas pli terura eĉ ol la morto.

Bonaparte iam diradis: mono, kaj denove mono! Sed mi diros, ke por ke ni estiĝu homoj tri aĵoj estas necesaj al ni: libroj, libroj kaj denove libroj!

Petko Slavejkov, poeto kaj sociaganto (17. 11. 1827 — 1. 7. 1895)

La verkisto iĝas ankaŭ ekzekutisto, sed nur por la malbono, nur por tiuj fortoj, kiuj minacas la vivon.

En neniuj aliaj kanto la ploro de la animo trovis sian tuthomaran esprimon, kiel en nia popola kanto.

Ni estas energia, riĉe dotita popolo, kiu havas sian originalan kulturon nur dank' al la popola kanto.

Konstantin Petkanov, verkisto (29. 11. 1892 — 2. 2. 1952)

Elektis kaj tradukis: Stojan Kostadinov

